

## MIA KATO

vortoj kaj muziko: Emanuele Rovere (Manŭel)

Havas mi nigran katon  
inteligentan kaj simpatian.  
Mi trovis lin, iun tagon,  
ĉe l'enirejo de l'hejmo mia:  
timema kaj malsata,  
de iu malbonulo forlasita;  
miaŭoj min igis pli ol kortuŝita.  
Donis mi bonajn manĝojn  
kaj lin regalis per ĝentilo mia.  
Ŝufiĉis du semajnoj:  
li reakiris tutan forton sian,  
fariĝis li la reĝo  
de la ĝardeno kaj de l'ĉirkaŭaĵo.  
Nun li surprizas per tiu ĉi strangaĵo:  
Mia kato, mia kato ŝatas tre fortajn karesojn.  
Li pensigas min pri l'homoj, kiuj celas la ekscesojn,  
ekstremajn sensaciojn, plendon de adrenalino,  
kontraŭ baroj, preter limoj, por aventur' sen fino.  
Kiam mi ekbalaas, li tuj kuŝiĝas apud piedoj miaj.  
Karesojn de mi li petas,  
ĉu mi konsentu al postuloj liaj?  
Mi lasu balailon,  
prefere prenu akran frastilon.  
Ĉu iam vidis vi pli strangan scenon?  
Mia kato, mia kato, ŝatas tre fortajn karesojn.  
Li pensigas min .....